

Kubo gajnas siajn unuajn du titolojn en Paralimpikaj Ludoj de Tokio



Kubo gajnis siajn unuajn du titolojn en la Paralimpikaj Ludoj en Tokio marde, pere de paratletoj Omara Durand, la sporta stelulino por handikapuloj, kaj la junulo de nur 18 jaroj Robiel Yankiel Sol.

Omara konkeris sian sesan kronon en la paralimpikaj ludoj, en la kategorio T12 (profundaj vidaj malfortoj) kaj fari?is la kubano kun la plej multaj oraj medaloj (6) en la historio de la paralimpikaj ludoj.

?i-marde, kune kun sia nedisigebla gvidisto Yuniol Kindelán, ?i gajnis la 400 metrojn kun bonega tempo 52.58.

Iom anta? la triumfo de Omara, la junulo de nur 18 jaroj, Robiel Yankiel Sol, gajnis la unuan oron de Kubo en la turniro, surprizante en la longsalta kategorio T47 per neatendita triumfo, saltante 7.46m

La plej juna membro de la kuba atleta delegacio venis al Tokio ser?ante sperton kaj iras kun la ora metalo.

La arĝentan medalon ricevis la nordamerika Roderick Townsed, ĉampiono de Rio Paralimpika, kiu ŝi-foje finis kun 7.36 m, dum la bronzon ricevis la rusa Nikita Kotukov kun salto de 7.34 m.

Aliaflanke, en para-naŝado, la plej bona kuba naŝisto, Lorenzo Pérez, ne povis kvalifikiĝi por la finalo de la 50-metra libera kategorio S7, ĉar li ne povis rekuperiĝi post malbona komenco. Li markis 32.27 sekundojn por fini lastan en sia grupo.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/deportes/268625-kubo-gajnas-siajn-unuajn-du-titolojn-en-paralimpikaj-ludoj-de-tokio>



Radio Habana Cuba